OFICIALA ORGANO
DE LA
KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

NUMERO 4

Mardon, 7-an de Aŭgusto, 1962

## EKSTREMORIENTO

Dum la 1961-a aŭtuno, mi faris vojaĝon al Ekstremoriento. De tiu vojaĝo, mi diskutas en resumo pri tiu, kiun mi vidis en urboj, kiaj Hon-kongo, Kowlono, Makao, Kangkoko, Singapuro, Johoro, Sajgono, Manilo, Havajo kaj Pearl Harbour.

Kun grupo de personoj, mi foriris el Montrealo por du monatoj al Tokio per aviadilo. Preskaŭ feliĉe, dank'al tajfuno en Japanio. la aviadilo estis devidata surteriĝi en Anchorage, Alasko. Ni trapasis tutan tagon en la urbo. Tio permesis nin viziti tiun usonan bazon. Dum la posttagmezo, ni reprenas la flugmaŝinon kaj post pluraj horoj ni alvenas Tokion.

Japanujo, paradizo de la Pacifiko, abundas en turismaj stacioj, ĉiuj planaj je belaĵoj. La lando konsistas ĉefe el kvar insuloj: Honŝu, Slukoku, Khuŝi, Hokka jdo kaj aliaj malgrandaj insuloj. Oni facile aliras Japanion per ŝipo au per aviadilo. La lando etendiĝas sur granda latitudo kaj prezentas grandan diversecon pri sia klimato. La geografia aspekto estas tre diversa kaj ĉiu regiono havas sian propan floron kaj faunon. Unu okulfrapa karakterizaĵo de la Japaniaj pejzaĵoj estas la diverseco de siaj montaroj.

Inter multnombraj pintoj kiujn ni vidas, estas Fuji-monto sur insulo Honŝu; ĝi estas konata tra la tuta mondo pri sia gracihava silueto. Ĝi estas ankau la plej alta pinto kun alteco de trimil sepcent kvindek-nau metrojn. Tie ankau troviĝas grandaj kaj malgrandaj lagoj kun nekomparebla ĉarmo, riveroj kiuj formas pitoreskajn kaskadojn kaj ravinojn.

Oni trovas termofontajn staciojn ĉie en Japanio. Situanta en mezvarma zono, Japanio neniam estas tro varma dum la somero kaj neniam tro malvarma dum la vintro, ĉiaj fervojaj linioj kaj ĝiaj autobusoj ofertas kumforton tutsame, kiel ĝiaj hoteloj kun okcidenta kaj japana stilo. Ĝi estas komparinda al la unuarangaj hoteloj de Europo kaj Ameriko.

Tokio havas du subvojojn. Taksion oni povas obteni laŭmende au surstrate, ĉiuj hoteloj havas aldadarojn kun multaj deversartiklaj magazenoj, kiuj permesas onin aĉeti ĉion, kion oni deziras sen eliri la hotelon, grava ekonomio da tempo dum vojaĝo.

La ĉefa stato de Tokio estas la "Ginza" por butiĝumi; ĝi similas la novjorkan "Broadway".

La japanaj silkoj ofertas nekompareblan kvaliton pro la sperto de siaj ĉinkturistoj. Aĉetindaj objektoj estas la porcelanon, brodaĵon, portfaritaĵon, klozoneaĵojn, lakaĵojn, japanajn pupojn, maskoj de "Noh", lanternojn, ventumilojn, bambuajn artiklojn, lignajn gravuraĵojn, fotoaparatojn,optikaĵojn, bambuajn artiklojn, kultivataĵn perlojn, k.t.p., k.t.p. La perloj estas belegaj kaj konvenas alĉies monujo. Nenia virino revenas sen aĉeti almenaŭ sian perlkolieron.

Por sin distri, vidinda estas la dramo de "Noh" kiu estas arta^jo de granda stilo. "Noh" estas karakterizita per recitado de ritmaj tekstoj akompanitaj de arkaika muziko kaj de simbolaj movoj de la aktoroj. La scenejo estas dekoraciita por la dramo kaj la aktoroj surmetas maskojn

Ankaŭ estas la "Kabuki" kiu estas teatra artaĵo eĉ pli populara ol "Noh". Kun ĝiaj superbelaj kostumoj, vone harmoniigitaj, ĝi estas la plej rafinita amuzaĵo enscenigita, "Kabuki" estas multe supera al la Novjorka "Music Hall", pro la riĉeco de siaj dekoracioj kaj scenoj. Oni prezentas dek-ses scenojn en unu sola prezento. Tio tre imponas la fremdulojn. En"Kabuki" la rolojn de virinoj ludas viroj.

Poste, oni povas ankaŭ vidi "la Bunraku" , teatrogrupoj, kiuj prezentas nur japanajn spektaklojn. Tamen ili ĝuas tutmondan famon. Ili uzas marionetojn tiel sperte, ke oni povus kredi, ke ili vere vivas. Fine, la "Kokusai", kie oni prezentas leĝerajn dramojn, de la burlesko ĝis la filmojn. Ĉi-supre estas la listo de ĉefaj teatroj en Tokio.

Ĉiuj ŝatas la tre belajn klubojn kun belaj "Geishas"; tiel oni nomas la japaninojn kiuj servas vin kun kimono. Por frandemuloj, estas multaj restoracioj kun japanoj specialaĵoj. Oni trovas eŭropan kaj ĉinan kuirmetodojn. Inter la senfina diverseco de japanaj plaĉoj, oni provu la "sukiyaki" kaj "tempura".

La "sukiyaki" estas bovaĵokaj vegetalo maldike tranĉita kaj kuirita en "shoyu", saŭco kun sukero. Oni manĝas ĝin ŝerpante rekte en la kraketanta pato.

La "tempura" konsistas el dikaj salikokoj kaj laŭsezona fiŝo, fritita en bonega vegetala oleo.

Kiel trinkaĵo, oni ŝatus la faman "sake", kiun oni faras kun rizo. Oni servas ĝin en malgranda senansa bovlo kun malgranda karafo por ĉiuj. "sake" estas boĝega. Oni taksas la japanan bieron, kiel unu el la plej bona en la mondo. Ĉiaj trinkaĵoj estas haveblaj en Japanio.

Pri sporto, "sumo" estas la tradicia loka lukto. Gigantaj pro fesiistoj praktikas ĝin. Estas ankaŭ "Judo", kiu estas speciala metodo por sin defendi; ĝi havas, universalan renomon. Estas ankaŭ, inter la diversaj sportoj la fiŝkaptadon, la ĉasarto, la skiadon kaj la glitkuradon.

La ĉefaj vidindajoj en Tokio por la turistoj estas la Imperia Palaco,restadejo de la Suvereno, la kvartalo de Marunouĉi, kiu estas la centro de la Komerca aktiveco de la ĉefurbo. Ankaŭ vidindaj estas la Parlamentejo, Ginza kaj Nihonbashi, la vojoj la plaj aktivajkaj la plej ŝikaj de la tuta Japanio, kun multaj butikoj,restoracioj teatroj, ktp, ktp.

Inter multaj, la plej popularaj kaj rimarkindaj muzeoj estas la Muzeo de Moderna Arto, de Popola Arto kaj la Nacia Muzeo. One ne devas forgesi supreniri en la Tour Eiffel, laŭskala modela de la pariza, kaj viziti la Sanktejoj de Yasakumi, la Asukasan Palacon la Parkon Meiji kaj la Ĝardenon Happoen.

Ni vizitis Kamakura via Yokohama, famekonata pro ĝia granda Budda, (Daibutsu) bronza statuo dektri me trojn alta kaj sepcentjaraĝa. Ni iris al Miyanoshita, termofonta stacio kaj belega pejzaĝo. Tie, ni loĝis en la Hotelo Fuyiya, situanta en la montaroj; ĝi estas rimarkinda por siaj internaj kaj esteraj sulfuraj naĝejoj. La internaj naĝejoj havas nomojn, kiaj "Naĝejo Revoj" "Naĝejo Sereno", la "Verda Banejo" kaj ceteraj similaj nomoj. Al la ĉambroj, oni ne donas numerojn sed nomojn de floro kaj arbo; tio estas tre originala kaj tre malsama al la amerika modo. Ĉiu havas sian japanan kimonon kaj siajn pantoflojn por iri al la naĝejo. Pri servistoj, ĉiu hotelo havas sian sandifektan galantecon. La japana monounuo estas la "jeno".

Ni trairas la lagon Hakone en plezurŝipo; ĝi estas treggranda lago de kie oni povas vidi la Fuji-Monto, kiam la brumo ne estas tro densa. Poste, ni vizitis la parkon Atami kaj alvenis al Kyoto, riĉa je historio kaj tradicio. En Kyoto, allogas la turistojn la Samktejo de Heinan, konstruaĵo famekonata pro la ruĝa lako, kiu ĝin kovras; ankaŭ vizitinda estas la temploj de Nishi kaj Higashi Henganji, japana budda arkitekturo, Ginkakuji(le Pavillon d'Argent), Kinkakuji, ( le pavillon d'or) , la antikva Imperia Palaco, la Kastelode Niji, kiu rekonis prosiajn ornamojn.

Ni renkontas ge japanojn vestitaj per diversaj kostumoj kaj oni povas ilin vidi, kiam ili malkaŝeme faras sian preĝon antaŭ la temploj ĉar ili estas superstiĉaj; por konfesdoni iliajn kulpojn, ili skibas siajn kulpojn sur paperpeco, kiujn ili alligas al la arboj. La malvarmuminta japano maskas sian buŝon. La gejapanoj prenas ĉiutagan banon varman ĉar ili estas tre puraj.

La grandaj magazenoj en grandaj urboj havas tegmenton sub, kiu oni luigas ĉambrojn. Ili ofertas ankaŭ plurajn ludojn, inter alia, unu grandan radon por amuzi la infanojn dum ke la patrino butikumas. Estas restoracioj, kie oni povas trinki "sake" kaj manĝi kaj ripoziĝi sub la suno. La viroj estas tre ĝentilaj kaj haltas por lasi la virinojn pasi.

En Nara, ni vizitas la parkon, kie vagas mulnombrajn cervojn, kiuj manĝas en niaj manoj, la Sanktejo de Kasuga, kie pendas metalaj lanternoj en granda nombro; la templon de Todaiji universale konata pro ĝia budda statuo je bronzo, dekses metrojn alta. Fine la templo de Heryiji, la plej antikva templo de Japanio kaj probable la plej antikva ligna konstruaĵo en la tuta mondo.

Via Kobe, ni alvenas al Osaka, la dua granda urbo de Japanujo. En tiu urbo, ni vizitis la Kastelon de Osaka, unua grandioza restarigo de tiu, kiu estis la plej granda kaj la plej potenca kastelo de la pratempo. Ni poste

vizitis la urbon Niko, ĉuhora vojaĝo vagonara el Tokio, en tiu urbo estas la splendora templo de Toshogu. Paranteze, oni ne devas forgeti demeti siajn ŝuojn antaŭ eniri la templojn. En Niko, ni faris malgrandan ekskurson al la lago Chuzenji, ovala lago dudek-tri kilometrojn de cirkonferenco, ĉirkaŭita per montoj. La Kaskado "kegon" estas ĝia elirejo kaj falas el cent metrojn en un kadro de akmirindaj arboroj. "Niko" estas tauga loko por trapasi ian ajn sezonon.

Japanio vere estas festolandio, De la grandaj urboj al la malgrandaj ĉilaĝoj, ĉiuj havas sian propran tradician festivalon kolorplenan, Ĝi estas la eksplodo de iu ĝo ja popolo glorianta la Dian helpon en ilia vivo de ĉiu tago. Viziti Japanujon estas efektiva plezuro.

S-ino L. Hardouin.

---

## ĜENERALAJ INFORMOJ

Ciuj el vi certe ŝatis lerni esperanton kaj eĉ priparolis la aferon kun viaj geamikoj. Se tio estas, ni petas bonvolu sendi la nomojn kaj adresojn de tiuj amikoj por, ke oni oficiale invitu ilin membriĝi al la K E K.

Ciuj jam scias, ke Kebeka Esperanto Klubo estas en Konstanta rilato kun la Kanada Esperanto Asocio ( KEA) . Tiu asocio estas la oficiala landa asocio kaj estas respondeca por ĉiaj esperantaĵoj en Kanada. Ĝi publikigas ĉiajn novaĵojn pri Esperanto, ne nur kanadajn sed ankaŭ tutmondajn. Antaŭ kelkaj vi ricevos inviton pri membriĝo, rekte de la Asocio mem kaj mi instigas vin jesi la inviton. Mi kredas,ke $1.50 sufiĉas por aniĝi al la asocio. Ĝi estas bona maniero pli scii pri aliaj samlandaj esperantistoj.

S-iro J. Gaucher.

---

## PROTOKOLO DE LA LASTA KUNSIDO DE LA ESTRARO:

La 26-an de Julio Kunsidis la estraro por pridiskuti kelkajn baldaŭvenontajn problemojn, efektive, nun estas tempo por pripensi la venontan lernejan jaron.

Tiuokaze, estis konsentite ke:

1) Denove, mi gvidos la kursojn de la lastjara grupo. Ci-jare, oni tamen uzos " La langue universelle Esperanto" de F. Baronnet.

2) Oni formos duan grupon de Esp-istoj kaj ilin instruos s-ro Eugène Mélanson, kiu esperantiĝis antau tri jaroj. Li tre kapablas en Esperanto, kaj li uzos la metodon de S-ino Héroux al Tri-Riveroj.

3) Pri la kursoloko, oni ankoraŭ ne decidis. Tamen, oni kredas, ke en venonta apero de L'Aloveko, oni anoncos, ke taŭga instruejo estas trovita.

4) La kursdaton oni destinis por la 11-an de oktobro. Komprenable se oni ne povas akiri ĉiujaŭdan lokon, tiam oni devos ŝanĝi la daton.


5) Por la profito de la novaj studentoj, oni pripensas specialan programon. Nekuberka invitito prelegos pri Esperanto kaj ties utileco.

6) La estrarano denove kunsidos je la fino de Aŭgusto.

S-ro J. Gaucher.

## KRUCVORTENIGMO

De Vincent Duepre



HORIZONTALA

1-Fruktoj el avelarbo-loke, kien iri
2-Seksa sufikso-edzino de la patrino (pl)
3-Ero de likvaĵo-malplori (apostrofita)-du konsonantoj
4-Denove imagi-du konsonantoj
5-En obei-en valoro-en ironio
6-Ano denove
7-Sufikso-likvaĵo
8-Adverbo-agrabla gusto
9-Parto de la korpo-gvidanto de la universo-Esperanto-Asocio
10-En tago-prepozicio-patro de patro (apostrofita)
11-Loĝi-spirebla gaso
12-Ovati-konjunkcio

VERTIKALA

1-De nigra raso (F)-prefikso
2-Adverbo-laŭvere
3-Montra pronomo-ujo
4-Subnubejo-Thomas Burke
5-Sufikso-prefikso-prefikso
6-Adverbo-maskontulino
7-Frakcio-sufikso
8-Malo de veni-sur la maro-du literoj de Levi
9-Malplores-en ario
10-Prepozicio-Bulgaria mono
11-Kanti en la tirolaj alpoj-malbonaspekta
12-Insekto-multvalora metalo